




Boletín

n° 431 Julio - Septiembre 2020



Asociación de utilidad pública

Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
aperanta de 1949
Numero 431

Redakto-skipto
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.
Revizio: Alejandro Pareja / J. A. del Barrio

Retadreso de la bulteno:
bulteno@esperanto.es
angelarquillos@gmail.com

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la respektivaj aŭtoroj
* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn
*Republikado de enhavo nur permesita kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro
Financaj aferoj: financoj@esperanto.es
Aliaj aferoj (escepte de financaj):
admin@esperanto.es

Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7
ES-28015 Madrid
admin@esperanto.es
Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31 0204011961
TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926 4025
Poŝtelefono: +34 638 547 104
Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon en la aŭtomata respondilo)

	Estraro
Prezidanto:	Ángel Arquillos López
Vicprezidanto:	Alberto Granados Orcero
Sekretario:	Manuel Parra
Vicsekretario	Isidoro Ortega López
Kasisto.	Jesús M. García Iturrioz
Voĉdonantoj:	Vicente Manzano (Viko)
	“ Ana Manero

Prezidanto HEJS
kaj voĉdonanto: William Guerrero

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)
DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8400

SALUTVORTOJ

Ŝajnas ke ĉio eblas, kaj hodiaŭ mi salutas vin ĉiujn, ne nur kiel kunordiganto de Boletín, sed kiel nova prezidanto de HEF, do mia laboro duobliĝis, sed mi volonte akceptas la novan defion, ĉar temas pri Esperanto kaj valoras la penon trairi la longan vojon ĝis la revata “lasta venko”, kiun mi, kiel poeto, povas vidi, sed ne tuŝi.

Malgraŭ la pandemio ni ne kunsidos kiel kutime ĉe granda salono en bela urbo kun homoj el pluraj regionoj de Hispanio kaj kelkaj landoj. Danke al la reto ni kapablas okazigi ĉiajn eventojn kaj tiamaniere ni pripensos la aferon organizi nian venontan kongreson. Mi ne kredas je mirakloj, sed mi esperas ke mirakle la sciencistoj trovos solvon kiel eble plej baldaŭ, ĉar Esperanto estis elpensita por kunigi la homaron kaj virtuale ne estas la sama afero.

En ĉi bulteno vi trovos tre interesajn raportojn kaj tekstojn pri variaj temoj, kaj ĉefe pri la Movado kaj eventoj, kiuj riĉigas nian lingvon. Bonajn kaj malbonajn novaĵojn.

Mi esperas kaj deziras ke vi ĝuos la legadon kaj pripensu la aferon partopreni per mallongaj raportoj, anekdotoj kaj temoj rilate al nia lingvo, ĉar ĉio estas interesa.

Kore salutas vin:

Ángel Arquillos
Prezidanto de HEF kaj kunordiganto de Boletín.

ENHAVO

Salutvortoj	1
Lastminuta novaĵo	2
Protokolo Eksterordinara Ĝenerala Kunveno	3
Nova estraro de HEF	5
Dankvortoj de la eksprezidanto de HEF	8
Pri grupoj kaj Asocioj	10
Ampleksa gazetara raporto pri Esperanto en Vocento	12
Bitoteko renovigita	13
Iliaj voĉoj en Esperanto	15
Nekrologe	17
Veni, vidi, ĉasi en "El Cazador"	21
Vortludeme	25
La unua fervoja linio en Hispanio	28
La 6-a Esperanto-Staĝo en Metabief	31

Ĉefpaĝa foto: Prezidanto de HEF

LASTMINUTA NOVAĴO

Ĵus publikiĝis la hispanlingva poemaro "Quemadura" (Brulvundo) de Jorge Camacho, enhavanta ĉiujn liajn poemojn escepte de tiuj aperintaj en 2018 en la hispanlingva "Palestina estrangulada" (Palestino strangolata). En "Quemadura" legeblas dek poemoj en Esperanto originale verkitaj kune kun la traduko en la hispanan.

Jorge Camacho Cordón

Quemadura

Ediciones Vitruvio

PROKOKOLO EKSTERORDINARA ĜENERALA KUNVENO

La 18-an de oktobro de 2020, je la 10:00 horo (dua alvoko) okazis la Eksterordinara Ĝenerala Kunveno en la oficiala sidejo, strato Rodríguez San Pedro, 13-3^o, de Madrid, kun telematika konekto kun parto de la ĉeestantaro.

Ĉeestis la estraranoj: Ángel Arquillos (vic-prezidanto), Jesús M. García Iturrioz (kasisto), Águeda Biurrún (sekretario), Eduardo Berdor (voĉdonanto), Alberto Granados (voĉdonanto), William Guerrero (voĉdonanto) kaj José Antonio del Barrio (prezidanto), kiu prezidis la kunvenon. Partoprenis ankaŭ aliaj 19 individuaj anoj (ĉeestantaj aŭ reprezentitaj) kaj 7 kolektivaj membroj (Andaluza E-Uniĝo, Kantabra E-Asocio, E-Grupo Bilbao, Liberano de Teruelo, Frateco de Zaragozo, Grupo de Esperanto de Fuenlabrada kaj Madrida E-Liceo) reprezentataj de sep el la ĉeestantaj individuaj membroj.

La sesio disvolviĝis laŭ la jena tagordo:

1.- Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa ordinara kunveno (24a majo 2020)
Oni aprobis unuanime la protokolon de la antaŭa kunveno aperintan en Boletín n-ro 430.

2.- Informoj kaj klarigoj pri la decidoj prenitaj en la Ordinara Kunveno, rilate al kontoj, raporto pri aktivaĵoj kaj buĝeto.

Unu ano demandis pri la mono dediĉita al HEJS. Pri tio decidis la nova estraro.

3.- Renovigo de la estraro.

Laŭ statutoj de la asocio, oni devas renovigi la estraron.

La prezidanto José Antonio del Barrio Unquera, la sekretario Águeda Biurrún González kaj la voĉdonanto Eduardo Berdor prezentis siajn demisiojn.

La sekvaj anoj kandidatiĝis por la postenoj de la estraro:

- Ángel Arquillos, prezidanto.
- Alberto Granados, vicprezidanto.
- Manuel Parra Benito, sekretario.
- Isidoro Ortega López, vicsekretario.
- Jesús Miguel García Iturrioz, kasisto.
- Vicente Manzano, voĉdonanto.
- Ana Manero García, voĉdonanto.
- William Guerrero, voĉdonanto kaj prezidanto de HEJS.

La ĉeestantoj aprobis tiun novan estraron, unuanime.

4.-Projektoj por 2020-2021

-La prezidanto José Antonio del Barrio informis pri la taskoj por la transiro al la nova estraro.

-Oni parolis pri la necertezo en la organizado de la Hispana Kongreso dum tiu ĉi periodo, pro la sanstato de pandemio.

-Oni decidis ke la nova estraro organizos la projektojn por tiu jaro.

5.- Sugestoj kaj demandoj.

-Oni informas pri la okazonta Benkontiĝo en Kanario. Organizado marŝas antaŭen, malgraŭ la duboj pri renkontiĝoj pro pandemio.

-Oni parolas pri la respondeculoj pri Universitatoj. La nova estrato decidis pri tiu afero.

-Oni sugestas pretigi retan kurson simile al tiu de Kolombio.

-Oni sugestas malfermi ĉe la retpaĝo de HEF spacon por helpi al la studentojn per Duolingo. La nova estraro okupiĝos pri tio.


Sen pliaj aferoj por pritakti, finiĝas la kunveno je la 11,00 horo.

La Prezidanto
José Antonio del Barrio Unquera

La Sekretario
Águeda Biurrun González

NOVA ESTRARO DE HEF

Jen kelkaj fotoj kaj datenoj de la nova membraro de HEF, kelkaj el ili tre konataj de ni.



Ángel Arquillos (Prezidanto)



Alberto Granados (Vicprezidanto)

Manuel Parra (Sekretario)

Naskiĝis en Segovia je 1963. Diplomiĝis kiel bazlerneja instruisto sed neniam praktikis tiun profesion. Ĉiam laboris kiel ŝtata oficisto en diversaj fakoj; ekde 1995 en Dirección General de Tráfico, en Madrido.



Esperanton eklernis en 1986, instruata de César de Mosteyrín kadre de monto-grimpada klubo en Segovia. Jam post kelkaj monatoj la kursanoj havis okazon provi la utilon de la lingvo, ĉar tri biciklantoj el Francio (inter ili Jorgos) inkludis nian urbeton en sia per-bicikla propaganda turneo tra Hispanio.

En 1995, logata de iu madrida esperantistino, ekloĝis en Madrido kaj komencis kunlabori kun Marcos Cruz en la centra oficejo de Hispana E-Federacio. En HEF poste nis kiel sekretario ekde tiu jaro ĝis 2005, sub la sinsekvaj prezidoj de Antonio Alonso kaj Miguel Ángel Sanchó. Samtempe partoprenis la madridan lokan movadon kunlaborante jen kaj jen al diversaj aranĝoj. En 2010 iĝis sekretario de Madrida Esperanto-Liceo kaj en 2014 ekprezidis ĝin, ĝis januaro 2020.



Vicente Manzano-Arrondo (Viko)
Voĉdonanto naskiĝis kaj loĝas en Sevilo (1963), sed loĝis en Barcelono dum la infaneco, tiel ke facile sinprezentas kiel andaluzo-kataluno. Esperantiĝis en 2016. Estas profesoro pri esplorado de la homa konduto en la Universidad de Sevilla, doktoro pri psikologio, pri edukado kaj pri ekonomio. Instruas pri statistiko kaj kvalita metodologio. Lia fako estas la subpremado kaj modeloj superi ĝin. Ekde la esperantiĝo tia okupiĝo fokusiĝis en la

lingva subpremado. En 2010 estis elektita la plej bona profesoro pri psikologio en Hispanio laŭ la landa asocio de studentoj. En la universitato, krom la kutimaj laboroj rilate al la instruado kaj la esplorado, partoprenas pluran movadojn, kiel Universidad y Compromiso Social [universitato kaj socia engaĝiĝo], kies celo estas la liberigo de la universitato por kunlabori en la liberigo de la socio. Lastatempe fondis -kune kun Unika (JUNG Yuro) kaj la Universidad de Sevilla- la entreprenon Civiencia SL, kies celo estas la demokratiigo de la scienco kaj la disvastigo de Esperanto en la scienca mondo. Ĉiujare instruas Esperanton, lastatempe neĉeeste. Ŝatokupoj: tro, ĉefe muzikumi, aŭskulti homojn, esplori, krei rakontojn kaj ami. Estas feliĉa patro de kvar gefiloj, amanto de nekredbla virino kaj fiera satano.

Isidoro Ortega López, (Vicesekretario), naskiĝis en Madrido la 1an de novembro 1962.



Edziĝinta kun du gefiloj. Li loĝas en Fuenlabrada ekde 1976. Li estis konscienc-objektanto. Li diplomiĝis pri Moderna Filologio en la UCM kaj en tiu universitato li akiris la pedagogian atestilon (CAP). Ĉe la URJC li faris studojn por doktoreco, akirante la DEA. Li estis profesoro ĉe Someraj Kursoj de UNED, kaj kiel preleganto partoprenis multajn konferencojn kaj seminariojn. Li estas aŭtoro de pluraj libroj de poezio. Li estis aktivulo en la junularaj, pacismaj kaj sindikataj movadoj. Li estas entreprenema kaj li partoprenis kun aliaj homoj en pluraj projektoj de kooperativoj kaj aliaj iniciatoj pri socia ekonomio.

Li estis kunfondinto kaj prezidanto de la asocio Fuenlabrada Esperanto-Ligo.

Li estas municipa funkciulo, nun en forpermeso. Socialisma magistratano de Fuenlabrada urbodomo ekde 2003, nuntempe li estas vicurbestro, sekretario de la loka registara estraro kaj delegita por la prezidanteco, malferma registaro kaj edukado.



Jesús Miguel G. Iturrioz, daŭrigas kiel Kasisto.



William Guerrero, prezidanto de Hejs kaj voĉdonanto.

Ana Manero (Voĉdonanto)



Naskiĝis en Madrido en 1963. Eks-instruisto, bibliotekisto. De 2007 ŝi laboras en la Nacia Biblioteko de Hispanio. Esperantisto de 1989.

Komence de la naŭdekaj jaroj ŝi komencis prizorgi la Bibliotekon Juan Regulo Pérez de HEF. Kadre de ŝia biblioteka agado, de 2009 ŝi kunordigas la projekton Bitoteko kune kun Miguel Ángel Sancho. Ĉi-rilate, ŝi demarŝis ĉe la Hispana Ministerio pri Kulturo kun la celo, ke la Bitoteko de HEF iĝu parto de la bitdeponejoj Hispana kaj Europeana, kio realiĝis en 2013. En 2016 ĉi projekto meritigis al HEF la duan premion de la Fondaĵo Antoni Grabowski. Krome, ŝi redaktas dulingve la bibliotekan retejon

kaj mastrumas la bibliotekan retkatalogon.

En du okazoj ŝi organizis bibliografiajn ekspoziciojn: “Esperanto en literaturo kaj literaturo en Esperanto” (kadre de la kongreso de Alcalá de Henares, 2005) kaj “Esperanto, de la individua al la kolektiva kreado” (Komerca Centro Gran Vía de Hortaleza, Madrid, 2008). Ankaŭ ŝi okupiĝis pri la redaktado de la enhavo kaj la elektado de la ilustra materialo de la itinera afiŝa ekspozicio “Esperanto, lengua y cultura”, unuafoje prezentita en 2009 kaj daŭre vojaĝanta.

Ŝi ofte artikolas, ĉefe por Boletín kaj ĉefe pri bibliotekaj temoj, sed ankaŭ ŝi sendas de tempo al tempo kontribuojn al aliaj revuoj, kiel Beletra almanako. En ĉi lasta aperis ŝia eseo “La glora parentezo “ (BA, n-ro 14, junio 2012) kaj ŝia traduko de la novelo “Blinda amo” (Amor ciego) de Rosa Montero (BA, n-ro 19, februaro 2014). En 2003 ŝi kunordigis la verkadon de la bitlibro “La deka logo”, en omaĝo al Liven Dek.

En pluraj okazoj, ŝi kunlaboris kun Miguel Fernández per kunprezentado de la lirikaj spektakloj de li organizitaj.

En 2015 al ŝi estis aljuĝita Diplomo pri Elstara Agado fare de la estraro de UEA. En 2017, la Premio Ada Fighiera-Sikorska, kadre de la Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo.

DANKVORTOJ

Karaj geamikoj: dum la pasintaj jaroj mi ofte verkis tekston en tiu ĉi Boletín kiel salutvortoj. Nun venis la momento verki ion alian, pli personan: mian adiaŭon kiel prezidanto de la asocio. Ne temas kompreneble pri vera adiaŭo, ĉar certe mi plu restas ano de la asocio kaj plu kunlaboros kun ĝi, kaj eĉ ne pri ĝislarevido, ĉar mi restas je la dispono de la nova estraro por io ajn pri kio mi povos esti utila.

Mia unua intenco estis fari pli ampleksan bilancon de tiu ĉi periodo dum la kongreso en Comillas, sed tiu ĉi damna viruso decidis aliel. Do, permesu ke mi simple iom retrorigardu per tiu ĉi mallonga teksto, al tiuj ĉi naŭ jaroj kaj duono kiu daŭris mian prezidantecon.

Naŭ jaroj kaj duono estas sufiĉe longa periodo. Fakte, mi rimarkis ke ĝi estas la plej longa periodo de ajna prezidanto de la Federacio, post ties kreado post la milito. Mi memoras ke mi unue akceptis en la eskoriala kongreso por kovri mallongan unujaran periodon, kaj tiam supozis ke temis pri io provizora. Poste la cirkonstancoj gvidis alie, preskaŭ senvole. Sed mi devas diri, jam de komenco, ke mi tre ĝuis la sperton, kaj ke mi des pli kontentas se homoj pensas ke mi povis esti iel utila al HEF kaj ĝenerale al la Esperanto-movado en Hispanio kaj aliloke.

Mi restas ja sufiĉe kontenta pri la rezultoj, se konsideri la modestecon de niaj rimedoj. Mia celo estis ĉefe diskonigi nian lingvon, kaj ekspliki al la publiko ĝian nunan realon, preter antaŭjuĝoj kaj miskomprenoj. Necesis (kaj plu necesas) levi la prestiĝon de la lingvo, montri ĝin kiel vivantan komunikilon kaj altnivelan kulturilon, kontraŭ la ideo de ankoraŭ tro multaj ke temas pri strangaĵo propra de stranguloj. Mi pensas ke pri tio ni multon sukcesis, el la kunlaboraĵoj kun administracioj, kun kulturaj institucioj, kun similcelaj asocioj aŭ kun sociaj movadoj, ĝis la agnoskoj de universitatoj, la ofta apero en amaskomunikiloj, aŭ la flua rilato kun verkistoj kaj artistoj. Stabiliĝis la asocio, reguliĝis kaj disvastiĝis la apero de niaj komunikiloj, niaj kongresoj kaj renkontiĝoj troviĝas nun inter la plej altiraj en Esperantujo, kreskis la kvalito de nia retejo, de nia bitoteko, de niaj sociaj retoj. Ne estas troigo diri ke la hispana movado estas modelo ene de la komunumo de nia lingvo. Kompreneble, ankaŭ restas multaj mankoj kaj certe ni perdis ankaŭ multajn ŝancojn, sed ni povas ja esti sufiĉe fieraj pri tio atingita.

Mi uzis la vorton “mi” ofte en la antaŭaj paragrafoj, ĉar mi volis verki tekston el persona vidpunkto, sed mi devas substreki ke fakte la agado ĉiam estis kolektiva, kaj se pri io mi speciale fieras tio estas la ŝanco arigi kaj kunlaborigi multajn amikojn, kiuj ja estis la atingantoj de tiuj sukcesoj, kaj kiujn mi ŝatus kore danki en tiuj ĉi lastaj vortoj. Unue, nepre, la membrojn de la sinsekvaj estraroj kiuj akompanis min dum partoj (kaj foje eĉ la tuto) de tiu ĉi periodo. Plej ofte mi estis kvazaŭ la vizaĝo de la asocio, kaj ilia laboro estis iom pli kaŝita, sed sen ili la asocio ne povas funkcii, kaj mi volas speciale

danki ilin ĉiujn. Ankaŭ la konstantajn kunlaborantojn, zorgantajn pri specifaj taskoj, aŭ tiujn kiu “ĉiam estas tie”, tuj respondante kiam oni petas helpon. Mi ne forgesu la organizantojn de kongresoj, kiuj ofte tiom ŝvitis por ĝojigi nin; niajn poetojn kaj artistojn, fiero de nia asocio; la respondeculojn de kursoj, sen kiuj nia komunumo ne povas kreski; la homojn tenantajn la lokajn grupojn kaj asociojn. Nu, ja multajn, kiujn mi devus mencii laŭnome, sed kiuj estas tro multaj kaj gravaj por ke mi ne risku iun forgesi.

Mi volas substreki tiun kunlaboradon, unue ĉar mi ŝuldas tiun dankon al ili, sed ankaŭ por substreki tiun kolektivan econ de nia laboro en HEF. Al iuj esperantistoj kiuj ne profunde konas la asocion kaj la movadon povas aspekti kvazaŭ la agado de HEF estas io “de la ĉefoj”, ke estas ia fermita grupo kiu faras ĉion. Nu, bedaŭrinde nia asocio estas tro modesta, sen profesiaj agantoj, kaj mi povas denove insisti ke ĉiuj iniciatoj kaj helpproponoj estas ĉiam bonvenaj.

Mi finas la mesaĝon dezirante bonŝancon al la nova estraro. Ili ja estas tre bona skipo, kaj mi tute certas ke ili povos antaŭenirigi nian laboron. Sed, kiel dirite, ne pensu ke ili povos fari ĉion kion ili ŝatus, kaj mi parolas el mia propra sperto por aserti ke ili certe bonvenigos viajn proponojn pri kunlaborado. Certe, ili, kaj vi ĉiuj, povas kalkuli ankaŭ kun la mia.



José Antonio del Barrio
(jam kiel eksprezidanto de HEF)

PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

Andaluzio (Sevilo)

De Sevilo Esperantujo organizas du kursojn, kiuj estas iom eksperimentaj. Mi prenos iom da teksto por la celo klarigi tian aserton.

Danke al la aranĝo de la profesoro pri turismo kaj financoj Guillermo Molleda [gigermo moĝeda], la Universitato de Sevilio agnoskas per 6 eŭropaj kreditoj la lernadon de Esperanto per kurso por komencantoj. Pro la decidoj ligataj al la nuntempa kronvirusa epoko, oni decidis instrui la kurson rete.

La entrepreno Civiencia SL (kies celo estas la demokratiigo de la scienco kaj uzas Esperanton kiel enan laboran lingvon) prenis la defion.

Unuflanke la esperantistino Unika realigis kanalon per Zoom kaj platformon, kiu baziĝas sur Moodle kaj nomiĝas B!S (Bona Internacia Studado). Aliflanke la esperantisto Viko aldonis alian kurson, ĉi kaze por progresantoj, kaj instruas en ambaŭ kursoj. Finfine, pli ol 80 lernantoj aliĝis al unu aŭ ambaŭ kursoj. Ili okazas ĉiumarde. La kurso por komencantoj okazas per la hispana de la 15a ĝis la 16a kaj duono UTC-hore. La kurso por progresantoj, de la 17a ĝis la 18a kaj duono UTC-hore. Ambaŭ esas senpagaĵ, kvankam oni dankas donacon, kiu estos uzita por zorgi projekton en Afriko, pri kiu ankaŭ zorgas la samaj entrepreno kaj universitato.

Neniu el ambaŭ kurso sekvas sisteman modelon. La komencantoj devas lerni ankaŭ per memstara programo aŭ libro. Ambaŭ kursoj konsistas en la praktika uzo de la lingvo. Ni renkontiĝas kaj babilas, profitante de la sperto por instrui pri gramatiko kaj pri la Esperanta kulturo (historio, komunumo, artoj ktp). En la kurso por progresantoj ni estas sufiĉe liberaj, faras teatraĵojn, ludas, demandas, solvas... Kelkaj sesioj okazas per bablado kun invititaj esperantistoj fluparolantoj. Ekzemple, la 17an de novembro la sesio por progresantoj temos pri migrado kaj babilos kun la aktivulo Cyprien el Benino, por kiu sperto necesas unue spekti la videojn de la jutuba kanalo de Cyprien.

Ĉiuj klasospertoj estas videe registritaj kaj alŝutitaj al jutuba kanalo por lernantoj. Eblas sekvi la kursojn per spektado de la videoj kaj plenumado de la ligitaj taskoj.

Viko (viko@us.es) zorgas ambaŭ kursoj. Kaj profitas de ĉi tiu okazo por peti helpon al vi. La kursoj estas sukcesaj pri la nombro da aliĝintoj.

Estus bone ke fluparolantoj helpus Vikon korekti la taskojn. Se vi taksas, ke vi povos fari tian taskon, bonvole ne hezitu kontakti Vikon kaj proponi ion.

Viko

Lucena (Kordovo)

EKSPOZICIO PRI ESPERANTO EN LUCENO (KORDOVO)

Dum la pasinta monato julio oni inaŭguris en la urbo Luceno (Kordovo) ekspozicion pri la internacia lingvo Esperanto. La ekspozicio okazis en la publika biblioteko kaj al



ties inaŭguro ĉeestis la skabenino pri kulturo de la Urbodomo la direktorino de la biblioteko kaj reprezentantoj de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. La ekspozicio estis ebla dank'al la steboj de José Carlos Pérez Romero, lucena esperantisto, kiu ricevis la apogon de la estraro de la biblioteko. Okaze de la inaŭguro la direktorino montris la materialon en nia lingvo pri kiu jam disponis la biblioteko, inter tiuj libroj troviĝas libro-metodo,

poemaro de García Lorca kaj ankaŭ Don Kihoto, ekzemplero de ĉi tiu lasta libro estis fiere montrata de la bibliotekistino al la ĵurnalistoj.

La ekspozicio konsistas el paneloj havigitaj de Hispana Esperanto-Federacio kaj dum kelkaj monatoj ili informis pri la lingvo Esperanto, literaturo kaj movado. Pri la ekspozicio kaj la inaŭguro abunde informis la kordova ĵurnalaro kaj eĉ la loka lucena televido.



Valencio

Kursoj VEG novembro 2020 Nova kurso en la Valencia Esperanto-grupo

La 3an novembro oni komencis novan kurson el nulo. La kurson oni faras, kiel ĉiu asocia agado nuntempe pro la pandemio de kronviruso, per videokonferenco. Tio ebligis ke eĉ homoj el Ameriko aliĝis al la kurso. Entute, la unua leciono atingis 22 samtempajn lernantojn.

Komence, Raúl Salinas klarigos la 16 gramatikajn regulojn. Poste, Elías Hernández, Eduardo Alonso kaj Rosa Zanón gvidos la instruadon per la BEK-kurso. BEK estas sukcesa paroliga kurso dezajnita de la spertoplena instruisto Dennis Keefe.

Kiel aliĝi al la ĵus-komenciĝinta kurso? Vizitu <https://valencia.esperanto.es/eo>. Tie, sub *Kurso el nulo 2020* vi trovos la plenan ĝisdatigitan priskribon, kune kun la ligilo por aliri la videokonferencon.

Tiu nova kurso aldoniĝas al aliaj delonge funkciantaj kursoj:

Legado kaj komentado de la Kihoto. La partoprenantoj legas hejme po unu ĉapitro semajne de tiu fama verko de la Hispania literaturo, kaj dum la kurso oni komentas la tekston kaj respondas al demandoj celantaj pruvi la komprenon de la legado.

- Legado kaj komentado de artikoletoj de Bitarkivo. Ĉiu lernanto elektas tekston de tiu paĝaro kaj legas kaj komentas ĝin.
- Decembre ni komencos novan kurseton kie ni laboros per artikoloj de la Vikipedio.
- Eduardo Alonso estas la mastrumanto de la videokonferenca sistemo.
- Elías Hernández zorgas pri anoncado de ĉiuj niaj agadoj sur Eventa Servo.
- Ofte ni ricevas gastojn el la tuta mondo, danke al la Interretumado. La pandemio fakte helpas al konatiĝo kaj kuniĝo de geesperantistoj de la tuta mondo.

AMPLEKSA GAZETARA RAPORTO PRI ESPERANTO EN VOCENTO

La suplemento “Vivir”, eldonita de la grupo de ĵurnaloj Vocento, kun la plej granda regiona disvastiĝo en Hispanio, inkludis la pasintan jaŭdon 10an de septembro ampleksan raporton pri Esperanto, kun deklaroj de José Antonio del Barrio, kiel prezidanto de HEF kaj personaj atestoj de esperantistoj de diversaj urboj de Hispanio.

La grupo Vocento inkludas jenajn ĵurnalojn: El Correo, El Diario Vasco, El Comercio, Sur, León Noticias, Hoy, Ideal, El Norte de Castilla, El Diario Montañés, La Verdad, La Rioja kaj Las Provincias.

La 10an de oktobro la samaj ĵurnaloj publikigis novan artikolon kun mencioj al Esperanto, ĉifoje pri la historio de la trinkaĵo nomata Mirinda. Temas pri nealkoholaĵo lanĉita en Hispanio, poste disvastigita al aliaj multaj landoj, sed kurioze, apenaŭ havebla nun en la lando de naskiĝo. La nomo venas klare el Esperanto, sed la apero kaj la rilato al la lingvo internacia estas iom mistera, laŭ la raporto. Ĉu indus pluaj esploroj en esperantaj arkivoj kaj publikigaĵoj?

BITOTEKO RENOVIGITA

Bitoteko¹ apartenas al Europeana² la bita arkivo de la Eŭropa Unio, ekde 2013. Por tion atingi, Hispana Esperanto-Federacio (HEF) subskribis siatempe kontrakton kun la tiam Ministerio pri Edukado, Kulturo kaj Sportoj, per kiu HEF cedis la utiligon de siaj metadatenoj kaj devigis sin adaptiĝi al la teknikaj postuloj de Europeana.

Komence, la afero estis relative simpla. Bitoteko devis nur ekuzi serion da specifaj metadatenoj laŭ la modelo ESE (Europeana Semantic Elements)³. Dum longa tempo, la afero bone funkciis kaj Bitoteko plenumis senprobleme sian devon.

Sed la informadika medio evoluas rapide kaj baldaŭ Europeana decidis ankaŭ evoluigi la manieron mastrumi la metadatenojn ricevitajn el la diversaj kulturaj institucioj tra Eŭropo, kun la celo unueciĝi la malsamajn modelojn de metadatenoj uzitajn de ili. Por tio Europeana disvolvis alian skemon de metadatenoj, EDM (Europeana Data Model)⁴, kiu altgrade plibonigas la antaŭan skemon ESE, kaj, cetere, ĝi krome ebligas la partoprenon de Europeana en la Semantika Retejo (Web Semántica)⁵. Resume, kiel rezulto de tiu nova sistemo, trovado de risurcoj en Europeana kaj tra la reto estos pli facila kaj la interŝanĝo de informoj inter institucioj multe pli efika.

Sed la modelo EDM sufiĉe kompleksas kaj ĝia plena aplikado ne estis facila tasko por la prizorgantoj de Bitoteko. Kvankam la transira periodo, en kiu Europeana akceptis metadatenojn en ambaŭ formatoj, EDM kaj ESE, Bitoteko ne sukcesis pretiĝi adekvate por la plena adopto de EDM.

Jam de unu jaro, la Ministerio avertadis nin pri tio, ke nepre ni devas adaptiĝi al EDM ĉar male niaj datenoj riskas ne plu esti valoraj por Europeana. Krome, aldoniĝis malfacilaĵo. Lastatempe la skipo prizorganta la informadikan flankon de Bitoteko iĝis malpli nombra kaj nun ni ne disponas kompetentulojn pri kelkaj bezonataj programoj, kiel, ekzemple, Java⁶. Cetere, la manipulado de la bitoteka programo kun la celo adaptiĝi al EDM verŝajne damaĝis la sistemon kaj ĝi ĉesis bonorde funkcii.

Ni, do, alvenis al sakstrato. Amasiĝis teknikaj problemoj, kiujn ni ne povis mem solvi kaj tio devigis nin serĉi profesion helpon. Ne abundas entreprenoj, kiuj fakas samtempe pri la programo (DSpace), kiu funkciigas Bitotekon, kaj la metadatenaj postuloj de Europeana. La bitotekaj prizorgantoj serĉis entreprenojn, kies ĉefa agado estu ĝuste sur tiuj du kampoj, ja tre specifaj. HEF petis tri buĝetojn por havi la eblecon kompari prezojn kaj servojn. Unu el la entreprenoj eĉ ne respondis. Alia, Digibís, proponis tutan reformon de la projekto, komencante de nulo per ĝiaj metodoj. La prezo: 19.360 € plus 4.500 € ĉiu-jare pro servo de gastigado en ĝia servilo. Io, kompreneble, tute ekster niaj kapabloj. La tria entrepreno estis ARVO⁷. Ĝiaj proponoj tute kongruis kun niaj bezonoj: adapti niajn metadatenojn al EDM, taŭge generi la bildojn de niaj bitaj objektoj, ripari la internajn misojn de la programo kaj renovigi la fasadon de la retejo. Cetere, ARVO mem proponis al HEF 25% da rabato sur la indikita tarifoj. La fina prezo, enalkulante impostojn kaj rabaton estis 1.934,79 €.

HEF, post enketado de la estraro inter informadikaj fakuloj, decidis ke la rilato inter servoj kaj prezo estis oportuna kaj mendis de ARVO la servojn.

La laboroj komenciĝis fine de marto kaj, parte pro la pandemio, daŭris ĝis septembro.

La fakto, ke la entrepreno okupiĝis pri la leona parto de la renoviga laboro, tute ne signifas ke ne estis pluraj aldonaj taskoj ankaŭ por la ĉiamaj prizorgantoj, sed mi ŝparas al la leganto ĉi tedajn detalojn. Pri la renovigo de la fasado, vi mem, enirinte, povos konstati la pli koheran ordigon de la informo, la aldonon de la angla kiel plia uzebla lingvo kaj la pli belan aspekton ĝenerale de la retejo.



Hispana Esperanto-Federacio

Bitoteka ĉefpaĝo Lingvo

SERĈU TRA LA INDEKSOJ

- La tuta Bitoteko
- Sekcioj & Kolektoj
- Aŭtoroj
- Titoloj
- Temoj
- Specoj de dokumentoj

Bonvenon al Bitoteko!

Bitoteko estas la nomo de la cifereca biblioteko de Hispana Esperanto-Federacio. Ĝi enhavas bitigitajn dokumentojn el Biblioteko Juan Régulo Pérez kaj aliajn bitnaskitajn, kiel rezulto de la agado de la Federacio. Ĝi konservas ankaŭ dokumentojn el eksteraj fontoj naciaj kaj internaciaj.

Sekcioj en Bitoteko

Elektu sekcion por listigi ĝiajn kolektojn

Biblioteko · Biblioteca

Gazetoteko · Hemeroteca

The screenshot shows the Bitoteko search interface. The search bar contains the word "esperanto". Below the search bar, the results are displayed in a list format. The first result is highlighted with a red box and contains the text "Oficiala instruado de Esperanto / Katalin Kováts (2014) | Kováts, Katalin; Hispana Esperanto-Federacio. Kongreso (73a. 2014. Ronda); Andaluza Kongreso de Esperanto (18a. 2014. Ronda)". The number of results is shown as "1 - 12 of 5,093 results".

Por fini, jen dateno: en la momento verki ĉi tekston, la serĉo “Esperanto” en Europeana redonas 5093 rezultojn el kiuj 4288 devenas el Bitoteko. La klopodoj penvvaloris. Nu, jen do Bitoteko denove preta kaj je via dispono. Profitu ĝin! Ana Manero

¹ <https://bitoteko.esperanto.es>

² <https://www.europeana.eu/es>

³ <https://pro.europeana.eu/page/ese-documentation>

⁴ <https://pro.europeana.eu/page/edm-documentation>

⁵ <https://www.w3.org/standards/semanticweb/>

⁶ <https://www.java.com/es/>

⁷ <https://www.arvo.es/>

ILIAJ VOĈOJ EN ESPERANTO

Tago de la verkistinoj, 2020

De antaŭ kvin jaroj, la Nacia Biblioteko de Hispanio (Biblioteca Nacional de España, BNE) celebras la Tagon de la verkistinoj (Día de las escritoras), iniciato organizita en kunlaboro kun la Hispana Federacio el Estantaj, Profesiaj kaj Entreprenistaj Virinoj (Federación Española de Mujeres Directivas, Profesionales y Empresarias) kaj la Asocio Klasikulinaj kaj Modernulinaj (Asociación Clásicas y Modernas), kun la celo depostuli la laboron kaj la heredaĵon de la verkistinoj laŭlonge de la historio.

La kvinan okazigon oni dediĉis al la ĉiutaga penado de virinoj. Jen la teksto, en traduko de Antonio Valén, kiun Elvira Lindo, la ĉijara komisarino de la evento, pretigis por la okazo:

Carmen Conde

Begoña Paz

Ana María Matute

Rosa Montero

María Ángeles Maeso

TAGO DE LA VERKISTINOJ

DÍA DE LAS ESCRITORAS

19a de oktobro 2020

Biblioteko
Juan Régulo Pérez

“Oni povus certe diri, ke la beletron verkatan de virinoj ofte spronas esenca konscio pri la penado. Per membiografiaj kleoj aŭ kiel reprezentado de kolektivo destinita al laborado malmulte aŭ neniom agnoskata, la virinoj esprimas kiom da streĉado necesas por ami, por ricevi infanojn aŭ por deziri solecon; kiom da volforto bezonatas por defendi sian alvokiĝon dum oni plenumas la taskojn tradicie virinajn. La voĉo de l' virinoj kutime implicas longtiran spiradon, konstantan konscion, ke la vivo ĉiam pli postulas de ili ol de la viroj.

Jen Teresa de Jesús aŭ Idea Vilariño, jen Luisa Carnés aŭ Alfonsina Storni, jen ankaŭ Elena Fortún, Luz Pozo, Concha Méndez, Mercé Rodoreda, Circe Maia, Gabriela Mistral kaj multaj aliaj, en kies verkoj speguliĝas la penado vivi, la multjara laborado, la laciĝo kaj la volo plenumi sian devon –malgraŭ la survojajn kaptilojn– pere de alvokiĝo obstina kaj intensa”.

Biblioteko Juan Régulo Pérez (BJRP), de Hispana Esperanto-Federacio, decidis akcepti la inviton partopreni, kiun per publika alvoko lanĉis BNE en diversaj profesiaj forumoj.

La kutima agado en BNE konsistas el legado de la tekstoj proponitaj de la responda komisarino en rilato al la elektita temo. La aliaj institucioj partoprenintaj povas, en siaj respektivaj sidejoj, legi la samajn tekstojn aŭ mem krei sian propran omaĝan programon.

La nunaj sanitaraj cirkonstancoj malrekomendas kunigon de homoj en malgranda spaco, kiel la sidejo de HEF. Tial nia agado estis virtuala. La tradukintoj de Carmen Conde, Rosa Montero, Begoña Paz, Ana María Matute kaj María Ángeles Maeso legis tekstojn de tiuj verkistinoj unue en la originala lingvo kaj poste en la esperanta versio. Nature, do, la titolo de nia aktivaĵo estis “Iliaj voĉoj en Esperanto”. La registritajn videojn HEF publikigis la 19an de oktobro, la Tagon de la verkistinoj, per diversaj medioj. Eblas daŭre trovi ilin en la jutuva kanalo de HEF¹ kaj en Bitoteko². Ne maltrafu ilin!

Ana Manero


¹ Dulingve: <https://www.youtube.com/playlist?list=PLX5Zs1YSAzT5LEemxj5SFJl8ow4ZLzasX>; nur en Esperanto: <https://www.youtube.com/playlist?list=PLX5Zs1YSAzT4K5lhbSqYgity1B6DhquZV>

² <http://bitoteko.esperanto.es> (La serĉo: "Día de las escritoras, 2020", redonas la dulingvajn videojn; la serĉo: "Tago de la verkistinoj, 2020" redonas ankaŭ la nure esperantajn)

NEKROLOGE

MEMORE AL ANTONIO MARCO BOTELLA

“Kaj mi foriros... kaj restos la birdoj kantantaj”




Jen la komenco, en esperanta versio, de tre bela poemo de Juan Ramón Jiménez. Tiu poemo aperas en la libro “Hispana Lirika Antologio” de Antonio Marco Botella. La titolo de tiu poemo estas “La definitiva vojaĝo”. Antonio ekfaris tiun vojaĝon la 4an de novembro 2020. Li mortis preskaŭ 100-jara.

Li naskiĝis la 23an de marto 1921 en Callosa de Segura (Alikanto). Li esperantistiĝis en 1937, dum la hispana enlanda milito, kaj gvidis siajn unuajn kursojn en ekzilo en Alĝerio. Reveninte al Hispanio, li gvidis novajn kursojn kaj helpis revivigi la zaragozan movadon ekde 1949. Li organizis diversajn hispanajn kongresojn en Zaragozo (en 1954, 1983 kaj 2013), kaj ankaŭ kunhelpis en la organizado de tiu de SAT en 1986 (Antaŭkongreso ĉe valo de Ordesa). Li estis redaktoro de Boletín, la bulteno de Hispana Esperanto-Federacio de 1989 al 1997 kaj de Kajeroj el la Sudo, la bulteno de Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj, de 1989 ĝis 1997 (“Nia koro ampleksas universojn”, bele proklamis en la unua numero en dec.1988). Li viglis kiel Sekretario de la zaragoza E-societo “Frateco”. De 2008 al 2019, li estis la Prezidanto de “Fundación Esperanto”.

Antonio Marco verkis diversajn librojn, beletrajn kaj historiajn. Inter la beletraj, la plej elstara estas “Lirikaj perloj de Al-Andalus” (1995, du eldonoj), kolekto de poeziaĵoj de la periodo de la araba konkero de la Ibera Duoninsulo. La enkonduko de tiu libro havis la jenan komencon: “Ĝam ni revenos en Al-Andalus, en la landon, kie regis Poezio, kaj Amo okupis tronon”

Li estas pli konata pro liaj historiaj verkoj, precipe pro “Analoj de la esperanta movado en Hispanujo” (1987, reeld. 1989), duvoluma. Li eldonis ankaŭ librojn pri la historio de la movadoj en Aragono (“Kroniko el la historio de Frateco”, 1983; kaj en la hispana “Un siglo de esperanto en Aragón”, “Unu jarcento de Esperanto en Aragono”, 2000), Valencio (“60 jaroj de Esperanto en Callosa”, 1992; kaj “Esperanto en la Valenciana Komunumo”, 2001) kaj en Katalunio (“Esperanto en Katalunio”, 2005). Li ankaŭ verkis pri la laborista hispana movado (“Laboristaj kronikoj”, 1996, SAT-Broŝurservo; en **2009 aperis** hispanlingva traduko eldonita de SAT-en-Hispanio).



En 2007 li publikigis en la hispana "La Odisea del Stanbrook - Memorias de un exiliado político" ("La Odiseado de la Stanbrook – Memoroj de politika ekzilito"), en kiu li parolas pri personaj travivaĵoj post la hispana enlanda milito.

En 2014 aperis publikigata lia 14a libro: "Hispana Lirika Antologio", flor-kolekto de pli ol 38 hispanaj verkistoj tradukitaj al esperanto. Interesa antologio de Antonio.

Esperanto estis tre granda elemento en la vivo de Antonio. Kaj tiu verda eliksiro certe donis al li multe da (longa kaj kvalita) vivo.

Mi memoris pri reveno kune kun li el iu esperanta renkontiĝo. Li jam iomete mal-

juna komentis al mi: "En mi estas pli da projektoj ol jaroj restas al mi por vivi. Mi estus dezirinta esti farinta pli por la prestiĝo kaj disvastigo de Esperanto".

Foje, revenis al la menso de Antonio agrablaj memoraĵoj kaj li ridemis. Foje, eĉ li kantetis esperante...

Li foje, montris al ni strangan poemon (kiu aperis en "Boletín" n-ro 410, p. 24). Tiu poemo de li alvenas al mi en la nuna momento iom frape. Jen la komenco de tiu poemo (verkita en 2011):

Fantazio pri postmorta vivo:

*"Hieraŭ mi songis ke mi songis,
Ke mi ne plu estis vive vivanta,
Ke mi estis ĉi mondon forlasanta
Iranta al Kosmo kie mi vere ĝojis
[...]"*


En la nuna cirkonstanco, kiel pri aliaj memorindaj homoj, ni intencu atenti pli al la lum (ig)aj flankoj ol al la tristaj sentoj.

LORENZO NOGUERO

MANUEL LÓPEZ HERNÁNDEZ(1956 – 2020)

*Kaj mi foriros. Kaj la birdoj daŭros
kaj ilia kanto.
Kaj restos mia korto kun ĝia verda arbo
kaj ĝia puto en blanko.*

*Juan Ramón Jiménez,
Nobel-premiita poeto de Moguer (Onubo)*



Ofte, kiam oni aŭdas pri *denaskuloj* ni pensas pri orienteŭrop-devena esperantisto, ĉe kies familio oni parolis malsimilajn lingvojn kaj kies gepatroj ekkonis unu la alian okaze de internacia kongreso. Jes, sendube tiu estis la deveno de la plejmulto da la denaskuloj. Tamen, tiu ne estis la origino de Manuel López Hernández.

Lia patro, Manuel López Serna, lernis esperanton en la jaro 1936, ĝuste en la komenco de nia terura civila milito kiam li estis apenaŭ 17-jaraĝa knabo en Callosa de Segura (Alakanto). Kune kun aliaj junuloj, inter kiuj indas menciigi al ĵus-forpasinta Antonio Marco Botella, li fondis en tiu malgranda vilaĝo tre viglan esperanto-grupon, kiu bedaŭrinde devis ĉesi fini ĉiujn agadojn kiam en la jaro 1939 la milito finiĝis. Malgraŭ tiu malpermeso kaj la fuĝo de kelkaj elstaraj membroj de la grupeto, kiel Antonio Marco mem kaj Francisco Zaragoza Ruiz, Manuel López Serna metis sian domon je la servo de la movado kaj tie, la esperantistaro renkontiĝis por praktiki la internacian lingvon. Esperanto ne estis movado bone akceptita de la nova frankisma reĝimo, sed Manuel López Serna ne dubis resti fidela al la Zamenhofa idealo.

Kiam la movado denove ekfunkciis leĝe en Hispanio, Manuel López Serna fariĝis SAT-reprezentanto en nia lando. Do, li agadis favore kaj propagande al asocio defendanta la liberigon de la proleta klaso ene de ŝtato kie ekzistis nur unu oficiala politika partio faŝism-devena, ne-kredeble! En la monato novembro 1956, Concha Hernández, edzino de Manuel, naskis du ĝemelajn filojn: Lorenzo kaj Manuel. Ekde la infan-aĝo la patro parolis al ili kaj al la ceteraj filoj en esperanto. Geedzoj estis hispanoj, do, unuavide, ne estis necese uzi plian lingvon ol la hispana ĉe la familio, krome, Manuel López Serna ne estis altranga universitata profesoro deziranta havigi al siaj filoj novajn lingvajn rimedojn, tute ne, ja li estis kanabo-rastilisto kaj tutcerte la riĉeco ne abundis ĉe li, li eĉ devis elmigri en la urbon Alakanton pro laboraj kialoj. Sed, malgraŭ ĉi tio Manuel López, fidela esperantisto, deziris instrui esperanton al sia idaro kaj cele al tio, li uzis la plej efikan metodon, tiu kiu baziĝas sur la konstanta kaj ĉiutaga uzo.

Jun-aĝe Manuel López Hernández studis en la porinstrua lernejo kaj post kelkaj jaroj li eklaboris en Korunjo (Galegio). De tie, meze de la 8-a jardeko pasintjarcente, li iris en Sevilon, tie li ankaŭ laboris kiel instruisto. Mi memoras, ke en la andaluzia ĉefurbo li elektis lernejon en unu el la plej malriĉaj kvartaloj, mi demandis al li kial tion li faris, ĉu ne estus pli taŭge elekti lernejon kun pli komforta lernantaro? Lia respondo estis firma, tute ne, li preferis instrui al infanoj laŭ simpla kaj rekta maniero, sen artefariteco, kaj tio nur eblis ĉe modesta lernejo.

En Sevilo Manuel López Hernández, Manolo, tuj kontaktis kun la tiea esperantistaro. Ĉiu-ĵaŭde li ĉeestis la Akademion de Esperanto de la strato *Sol*. Kiam tiuj klasoj/renkontiĝoj finiĝis ni ĉiuj vizitis apudan trinkejon kie abundis ŝercoj, biero, kaj la plej alta lingva nivelo de mi iam aŭskultata. Manolo perfekte integriĝis al la urbo Sevilo, ĉiujare li vizitis la mondfaman tiean foiron kaj li eĉ kapablis paroli laŭ la sevila parolmaniero. Fine de la 8-a jardeko Manolo, kune kun aliaj membroj de la Sevila grupo, decidis reorganizi la instruistan E-movadon en Hispanio, tiel li fariĝis la reprezentanto de ILEI en Hispanio kaj li laboris por aranĝi novan ekzamenan kaj diploman studplanon por la instruado de Esperanto en Hispanio.

En la jaro 1989, okaze de la Hispana Kongreso de Esperanto okazanta en Bilbao, nova teamo eniris en la estraron de HEF. Antonio Alonso Nuñez estis la nova prezidanto kaj Manuel López Hernández la sekretario de la Hispana Federacio. Sed li preferis nomi la postenon kiel “agantan sekretario”, ĉar li neniam povis pripensi postenon aŭ okupon en la movado se tie li ne povis efektiviĝi sian laboremon. Li estis la sekretario de Hispana Esperanto-Federacio ĝis la jaro 1993.

En tiu jaro li ekigis novan periodon en sia vivo. Li marŝis el Sevilo en *Moguer*, vilaĝo en la provinco Onubo. Tie li laboris kiel profesoro, poste eĉ direktoro, en la Gimnazio “Juan Ramón Jiménez” kaj ankaŭ tie li ankaŭ konis Amalia, sia kunulino ĝis sia lasta vivo-tago. La patro de Manolo, tiu alakantano kiu 17-jaraĝa lernis la internacian lingvon, forpasis en la jaro 2012. Tiam la filo skribis nekrologon sur ĉi tiu sama revuo kaj li parolis pri sia patro kiel *honesto laboristo kun vivo simpla kiu revis atingi mondon pli justan, fratecan kaj liberan*. Post legi tiujn vortojn mi povas certigi, ke Manuel López Serna ne nur instruis novan lingvon al sia filo, li ankaŭ montris al sia filo novajn idealojn kaj sekvindan vivo-vojon, ĉar ankaŭ tiuj estis la revoj de Manuel López Hernández.

La pasintan monaton oktobron Manuel López Hernández forpasis. Tamen, sciante, ke iu vivas dum ekzistas memoro pri li, do Manolo vivos dumlonge. Kaj en tiu memorata vivo li ĉiam parolos esperanton dum ĵaŭda vespero en Sevilo, antaŭ freŝa biero kaj ĉe bonhumbora kaj esperoplena etoso.
Vi pace ripozu, kara amiko Manolo !

J.M.R.H.

Veni, Vidi, Ĉasi en "El Cazador": Unu Ludo kaj Unu Konkludo

Dennis Keefe, Cullera (Valencio)

Antaŭ nelonge en la dua de septembro aperis kvar novaj ludantoj en la fama hispana televida konkurso nomata "El Cazador" (La Ĉasisto), gvidata de la simpatia Sinjoro Ion Aramendi. Unu el tiuj kvar novaj konkursantoj estis nia kara Esperantisto Tonjo de la Barrio, kiu nun estas sperta partoprenanto en tiaj programoj. Jam lastjare li sukcese kunludis dum pli ol unu semajno en alia bone konata televida konkurso "Saber y Ganar" (Scii kaj Gajni).

Kelkaj el vi certe rigardis la programon tiun tagon, kaj se ne, per simpla retserĉo per la vortoj "El cazador, programa 115", vi povas trovi kaj spekti ĝin. Dum tiu programo, kaj ĝuste tio kio interesas nin estas la fakto, ke la vorto Esperanto aŭ la uzo de Esperanto en komunikado aperadis ĉirkaŭ 15-foje. Vere impresa rezulto.

Tiom da mencioj pri Esperanto certe helpas, ke la spektantaro, taksata je 662.000 (fonto: ecoteuve.es), longdaŭre kaj favore memoros Esperanton, pri kio mi parolos en la lasta parto de ĉi tiu artikolo. Sed antaŭ ol iri al mia konkludo, eble vi volas mem fari la ludon. Jen dek demandoj kiuj rilatas la mencion kaj uzadon de Esperanto dum La Ĉasisto. Kelkaj demandoj estas sufiĉe facilaj, aliaj ne. La respondoj troviĝos ĉe la fino de la artikolo. Estas vi, kiu nun estas la konkursanto. Bonan ŝancon!

1. La prezentisto, Ion Aramendi, gratulas al Tonjo ĉar li parolas a) La rusan b) la germanan c) Esperanton ĉ) Volapükon.
2. Aramendi ŝercas, dirante ke estas eble nur X homoj kiuj parolas Esperanton en la tuta mondo. X = a) nur unu b) miliono da c) miliardo da ĉ) dekmiloj da
3. Aramendi demandas al Tonjo: a) Kie oni parolas Esperanton b) Kiel oni diras "El Cazador" en Esperanto c) Ĉu estas muziko en Esperanto ĉ) Ĉu Esperanto havas propedeŭtikan efikon aŭ ne.
4. Aramendi petas de Tonjo, ke li diru ion al sia kontraŭulo en la ludo (ŝi nomiĝas Ruth de Andrés, kromnome La Gobernanta). Kion diris Tonjo en Esperanto al ŝi? a) Rozo estas rozo estas rozo b) En la mondon venas nova sento c) Vi ne sukcesos ĉasi min ĉ) Mi venis, mi vidas, mi venkos.
5. Neatendite la kontraŭulino diris ion al Tonjo en perfekta Esperanto. Kion ŝi diris? a) Saluton al vi, Tonjo b) Estas mi kiu venis, kiu vidas, kaj kiu venkos c) Mi parolas Esperanton iomete ĉ) Ĉu vi fartas bone?
6. Aramendi tiom miris, ke kaj Tonjo kaj lia kontraŭulino parolis Esperanton, ke li mem komencis paroli fremdlingve. Kiun lingvon li fuŝe parolis? a) la francan b) Esperanton c) la latinan ĉ) la anglan.

7. Refoje, Aramendi petas de Tonjo, ke li traduku alian hispanan vorton en Esperanton. Kiun vorton? a) conservador b) tocomocho c) triquitraqui ĉ) concurso
8. Dum la programo El Cazador kiom da homoj entute parolis multe aŭ iomete en Esperanto? a) Nur unu, Tonjo b) Du, Tonjo kaj la kontraŭulino c) Ses, ĉiuj partoprenantoj en la konkurso-programo krom unu ĉ) 506, La konkurso-partoprenantoj kaj la tuta ĉeestantaro kiu diris ĉe la fino “Ĝis revido, krokodilo”.
9. Ĉe la fino de la programo, Aramendi deziras al ĉiuj Bonan Lernadon. Pri Esperanto li diris hispane, a) Aprended a hablar el Esperanto b) Hay buenos cursos en Rodriguez San Pedro c) Besos a los Esperantistas ĉ) Viva el Esperanto.
10. Ĉi lasta demando ne rekte rilatas Esperanton, sed ĝi estas interesa: Entute kiom da mono gajnis la teamo de Tonjo por unu tago da laboro? a) Nur sufiĉe por pagi busbiletojn por iri al kaj reveni de la televida stacio b) Ĉirkaŭ ok mil eŭroj c) Ĝuste 23 mil eŭroj ĉ) Post la konkurso Tonjo aĉetis kastelon en la montoj de Svislando.

Mi esperas, ke vi bone sukcesis en nia konkurso! La respondoj troviĝas sube. Se vi havas dek bonajn respondojn, vi eble povas akompani Tonjo-n al iu venonta konkurso. Se vi havas naŭ, vi eble povas reverki mian artikolon kaj publikigi ĝin aliloke. Se vi havis neniam da poentoj, vi havis tre malbonan ŝancon, tiom ke mi rekomendas al vi, ke vi aĉetu ĵetkubojn por utiligi en venonta provo.



Nun, revenante al la serioza parto de ĉi tiu artikolo, kelkaj rimarkoj kaj konkludo. Dum jaroj kaj jardekoj ni Esperantistoj klopodadis informi al la ekstera mondo pri la ekzisto kaj pri la taŭgeco de Esperanto kiel internacia helplingvo. En Madrido mi memoras kelkajn frostajn noktojn kiam ni iris grupe surstrate kun siteloj, brosoj, gluo kaj afiŝoj provante meti nian anoncon pri Esperantaj kursoj ĉie kie eblis. Ankaŭ en tiuj jaroj ekaperis de tempo al tempo artikoloj en ĵurnaloj, kaj eĉ intervjuoj en radio. Esperanto-informado en tiuj sepdekaj kaj fruaj okdekaj jaroj abundis.

Sekve de tiu ofta kaj daŭra informado pri Esperanto, ankaŭ abundis kursoj en la Liceo de Esperanto, kiu situis en numero 98 de la strato Atocha. Ĉiudumonate ekis kurso kun 30, 35 homoj je la baza nivelo kaj samtempe okazis aliĉambre dua- kaj triagrandaj kursoj. Homoj venis kaj venis kaj venis, ĉar ili aŭdis pri Esperanto, legis pri Esperanto, vidis niajn abundajn afiŝojn. Mi mem estis unu el tiuj homoj kiu en vintro 1980 ie en Madrido, eble apud la Plaza Mayor, mi vidis anoncon surgluitan sur muro pri venonta kurso de Esperanto.

Sed tia glora epoko dum la madrida "movido" ne plu ekzistas, bedaŭrinde. Nuntempe oni ege malofte vidas ion ajn rilate Esperanton, kaj tio ne estas problemo nur en Hispanio. Tra multaj partoj de Eŭropo kaj aliloke ne plu estas sufiĉe da informado pri Esperanto, por ke la verda ideo restu aktive enmense. Sed homoj neniam vidas informon pri Esperanto, ili ne pensos pri Esperanto, kaj sekve estas nul ŝanco, ke ili eklernos ĝin.

Tamen estas vere, ke videbletas pli kaj pli da esperanto-informado ĉe la interreto, sed ankaŭ veras, ke estas miloble, milionoble pli da informado pri ĉiaj aliaj aferoj. Pro tiom da ne-esperantaj informoj, reklamoj, komunikaĵoj, varbaĵoj en la aero, homoj preskaŭ neniam remarkas informon pri Esperanto. Sciu, ke la strategio en merkato ne estas, ke via esperanta Fejsbuka paĝo havu 10,000 ŝatojn, sed ke ĝi havu relative pli da ŝatoj ol aliaj paĝoj. Ne helpas en la informado-ludo se vi metos centojn da anoncoj ĉiutage, sed en la lastaj dudek kvar horoj estas mil milionoj da tiaj novaj anoncoj, komunikaĵoj, varbaĵoj pri ĉiuj aliaj aferoj en nia universo.



Simila komento pri Jutubo. Estas nun kelkaj esperantaj filmetoj kiuj atingas mil aŭ pli vidojn en la spaco de unu jaro. Sed tio ne sufiĉas. Ni bezonas altigi tiun kvanton je faktoro de 10, de 50, de 100, de 1000 por komenci havi la saman efikon de niaj stratafiŝoj de antaŭe. Se ni povas konkeri, ni diru, la virtualan spacon, ni aŭtomate havos pli da homoj kiuj volos lerni Esperanton. Estas afero de statistiko. Sed, feliĉe, ankaŭ estas afero de kvalito.

Kaj ĝuste tiun lastan trajton oni spertis en la partopreno de Tonjo del Barrio en la televida programo El Cazador. Estis, kiel dirite, ĉirkaŭ 15 utiligoj de Esperanto. Krome, la gvidisto, Ion Aramendi mem interesiĝis pli aktive pri la afero, kaj ŝajnas, ke plejparte estis la ideo de la televidistoj reliefigi Esperanton dum la programo. Tio estas eble indiketo, ke en la mondon de la amaskomunikilo venas ia nova sento.

Koncerne El Cazador, ĉiuj partoprenantoj en la unuhora programo krom la frue eliminata konkurencanto, nomata Airam, diris kelkajn vortojn en Esperanto. La konkurancantino, La Gobernanta, suprizis ĉiujn per perfekte parolata esperanta frazo, "Ĉu vi fartas bone, Tonjo?" Kaj finfine, aldone al la esperantaj partoj, la gvidisto eĉ ŝanĝis sian lingvon por paroli en iaspeca latina lingvo, kio kreis koheran kadron por la Esperanto-informado.

La ununura mankanta parto de tiu optimala tago por Esperanto estis ia posta kunligo de la informado kun la ekstudo de Esperanto. Estas probable, ke dum aŭ post la programo multaj el la spektantoj kontrolis la vorton Esperanto en Guglo, en Vikipedio. El tiuj homoj eble kelkdekaj trovis kaj komencis la esperantan kurson en Duolingo. Ĉio ĉi estas bona, sed se estus rekta oferto, iamaniere, al tiuj homoj, 662.000 el ili, pri nova kurso de Esperanto, estus multoble pli da hispanoj kiuj eklernus Esperanton, kaj certe, estus kelkaj el ili kiuj restus en niaj lokaj kluboj, en nia komunumo.

Konklude, la partopreno de Tonjo kaj multfoja menciado pri Esperanto en tempospaco de nur unu horo estas unu el la plej bonaj modeloj por informi efike pri Esperanto. Restas al ni disvolvi tiun strategion se eblas, hispane, eŭrope, monde. Kaj por fini, unu el la kernaj ideoj menciitaj de Tonjo en tiuj minutoj estas ke la Esperantistoj aktuale abundas kaj ili troviĝas en la virtuala mondo. Koncize: antaŭe en la 20a jarcento Esperanto forte vivis; en la lastaj jardekoj ĝi iom dormetis; sed nun en la tre nova epoko, ĝi forte revenas en la virtuala mondo. Eble tio povas esti unu el niaj venontaj bazoj por antaŭenigi la informadon kaj varbadon pri Esperanto. **ESPERANTO REVENAS. Jes ja, RE-venas.**

Respondoj: 1c, 2a, 3b, 4c, 5ĉ, 6c, 7a, 8c, 9ĉ, 10c

VORTLUDEME

De la alto de la ekzalto ĝis la fundo de la profundo, eblas vortludi aŭ ludvort(um)i... aŭ permesi, ke la vortoj ludu kun ni. Ja vivo kaj vortoj estas interligitaj kaj eĉ interkudritaj en la teksitaj tekstoj de la realo kaj de la malrealo.

Nun, mi sugestas rigardi iom ludeme al tiuj malgrandaj (lit)eroj aŭ iloj (vortoj, frazoj...) per kiuj ni parolas kaj pensas (foje...).

Esperanto ja estas aparte manipulebla. Miaopinie, ĉiu esperantisto spertas la plezuron trovi aŭ krei iajn kombinojn kiuj estus spritaj aŭ surprizaj. Menciindas kelkaj aparte lertaj kiel Raymond Schwartz, Jorge Camacho aŭ István Ertl (ekzemple, li verkis tekstojn uzante el inter la vokaloj nur unu el la kvin).

Nu, jen tri tipoj aŭ kategorioj kun ekzemploj en Esperanto:

Pangramo (aŭ pantogramo)

Pangramo (aŭ pantogramo", se "preferindas, por eviti la eblan duoblan signifon de "pangramo", okaze de "grama tiklo") estas frazo aŭ teksto en kiu oni uzas ĉiujn literojn de ia alfabeto. Ni iru al nia esperanta lingvo.

Jen duvorte: *eĥoŝanĝo ĉiujaŭde*.

Jen pli konata frazo: *Kuba harpisto ŝajnis amuziĝi facilege ĉe via jaŭda ĥoro*.

Jen omaĝe al Majstro: *Laŭ Ludoviko Zamenhof bongustas freŝa ĉeĥa manĝaĵo kun spicoj*.

Palindromo

Vorto aŭ frazo kiu sencohave legeblas ambaŭdirekte aŭ ambaŭsence.

Kelkaj distingas inter du specoj: unusignifa (ekz.: "oro") kaj dusignifa (ekz.: "aroma"). Por multaj nur validas la unua tipo.

En Esperanto mi ne certas pri la plej longa palindromo. En aliaj lingvoj ni povas mencii: Darío Lancini verkis hispane kuriozajn tekstojn, kiel "Oír a Darío" (1975); Lawrence Levine skribis angle "Dr. Awkward & Olson in Oslo" (1986), palindroma teksto kun 31.594 vortoj (!)

Por komenci, jen simpatia eltrovo (el la revuo "Fonto"):

VORTOTROV

Jen aliaj, malpli pli longaj:

Ora trovo: vortaro.

Amis korpo proksima.

Anaso sana.

Orumata muro.

Sato idiotas.

Nu, nur bele celebru nun.

Apud Olga sidis aglo dupa.

Sane volema kora raro kamelo venas.

Etul' finiru same ove naive, via nevo emas urini flute.

Al bon' la mort' tro malnobla (Nikolai Lozgačev).

Ene tute ne / estas sat', se / satrukt' kurtas (palindroma poemeto de Jorge Camacho).

Memoru ne matene juĝi, ne cedigi. Raru bele, ine. Neniĝu ebura rigidec' eniĝu. Jen eta menuro mem.

Lang(o)rompilo aŭ lang(o)tordilo:

Frazo aŭ esprimo kiu celas defii la artikuladon de la parolanto.

*Petro, vi la permeson de la patro nepre prenu por partopreni entreprenon.
Ĉu ŝi ĉiam ĉe ĉio ruĝiĝas?*

Bananananasanasbano aŭ bano de banan-ananasa anaso.

Serpo servu ŝin por ĉerpo el cerbo de serba cervo.

La oleoj el ajlo jam je junio junas.

Ĉu ŝi scias, ĉu ĉi-scene la sklavo ŝtelos la sceptron?

Ŝi ŝerce ŝanĝis la ŝarĝaĵon.

Ĉe la libroŝrankoj traspertu travivi la kulturscion!

Tri tre drinkemaj fratoj frote trafis truon de l' trotuaro.

Frivolaj friponoj fervore priridas perfortajn fervojojn.

Scivolema sciuro scias ke li scintilas por la scienco.

Eĥoŝanĝo ĉiuĵaŭde.

Ne plu ploru, plorulo, pro propra plezuro.

Ŝi, ŝue starante sur ŝoseo, senŝeligas ŝosojn.

Ŝi ŝerce serĉas sorĉan ŝancon.

Transskribo de dekstra ekscio kun eksscio.

Al la apartamento parte apartenas aparta portaparato.

Sciu, sceneja sciuro science scintilas.

Sciencivola sciuro dissciigas socisciencajn sciojn.

Kara Karlo klare korektas kolekton de ĝustaj gustoj.

Koleras Karlo dum korektado: kolekton karan ne kadras krado! // Kaj krias l' koro kun krako krusta: ĝustigo ĵusa ne estis justa!

Sciencisto incitiĝas ekzalte dum intenca citado de mallica fikcio, sed ekscitiĝas eksalte dum intensa studado de ekzakta scio.

Pri la supraj kategorioj mi okulumis en interreto, en vikipedio... Eĉ jam aperis foje en "Boletín" (n-ro 273, jan.-feb.1986). Mi koletis multajn kaj nun mi (s)elektis kelkajn por iuspeca parado kiu povas utili por kurioza okulumado, scivolema elmontrado aŭ amuza pronocado.

Meze de tia vorto-vortico, mi emis kundividi kun vi tiajn kuriozajn specimenojn. Eble vi emos multipliki ilin redunde, abunde, fekunde...

OREUGON OZNEROL

LA UNUA FERVOJA LINIO EN HISPANIO

Post kelkaj sen-sukcesaj provoj dum la fino de la 18-a jarcento, en la jaro 1812 ekmarŝis en Britio la unua lokomotivo kiu kapablis treni vagonaron. Tiu unua lokomotivo ricevis hispan-lingvan nomon *Salamanca*. Tamen, nur en la jaro 1825 tiu nova transportilo utile efikis por porti varojn de unu urbo en alian, ĝuste de la urbo Stockton ĝis Darlington, en la nord-orienta regiono de Anglio. En la jaro 1830 oni inaŭguris la unuan fervojan servon por vojaĝantoj, de la urbo Manĉestro ĝi Liverpolo. Ĉi tiu unua linio sukcesis kaj tiel, nur 10 jaroj poste, en Eŭropo kaj en Ameriko jam estis konstruitaj 9.000 kilometrojn per reloj.

En Hispanio libroj pri historio asertas, ke la unua fervoja linio unuigis la urbojn Barcelono kaj Mataró en la jaro 1848. La celo de tiu linio estis pliigi la komercajn rilatojn inter Barcelono, tiam urbo kun 200.000 enloĝantoj, kaj la marborda apuda regiono, kun 40.000 anoj. Tiutempe varoj vojaĝis inter unu kaj alia loko ĉefe pere de ŝipoj. Kompreneble la nova fervoja linio pliigis tiun komercon.

Tamen ĉi tiu historia konitaĵo ne estas ĝuste tutcerta. Se ni scias, ke en tiuj jaroj, meze de la 19-a jarcento, Kubo estis hispana kolonio, eĉ hispana provinco de la hispana regno laŭ la tiutempa leĝaro, do, la fervoja linio konstruita fine de la 3-a jardeko de la 19-a jarcento en la kariba insulo, povus esti konsiderata kiel la unua trajno kiu funkciis en Hispanio, kompreneble ankaŭ en Kubo.


Estas necese antaŭkoni, ke post la ribelo de la franca kolonio Haitio, Kubo fariĝis la plej grava eksportanta regiono en la mondo pri sukero. La produktado pliigis kaj tiel, estis necese havi efikajn transportilojn. Tiam, la sukero vojaĝis de la suker-rafinejoj ĝis la havenoj pere de malrapidaj ĉaroj, krome la pluv-sezono malfaciligis la transportadon.




Reklamo de la unua fervoja kompanio de Kubo, tiama hispana provinco.

En tiuj jaroj oni favoris projektojn por faciligi kaj plirapidigi la transportadon de sukero. Sevillano, loĝanta en Londono, S-ro Marcelino Calero Portocarrero proponis la konstruon de fervoja linio en Kubo. En la metropolo la hispana registaro havigis al tiu sevila entreprenisto la koncesion de la konstruo de fervojo inter la urboj Jerezo kaj El Puerto de Santa María, kun la celo ankaŭ pliefikigi la transporton de la ŝerea vino, ĉefe al la britaj merkatoj.

Do, li proponis saman projekton en Kubo por transporti sukeron kaj cele al tio, li sendis al la guberniestro de la insulo broŝuron pri tiu onta linio Jerezo-El Puerto de Santa María, kun la peto konstrui saman transportilon en Kubo. Tamen, la kuba guberniestro preferis alian alternativon: konstruon de lignaj reloj sur kiuj povus trairi ĉaroj trenitaj de ĉevaloj. Ĉi tiu projekto fiaskis, jam estis vaste konata la sukceso kaj efiko de la fervojoj, do, fine, la kuba provinca registaro petis krediton je 1,5 milionoj da pesoj por konstrui fervojan linion inter La Havano kaj Güines. La hispana registaro en la metropolo apogis la peton de la kredito.



La laboroj por la konstruo de la fervoja linio komenciĝis en la jaro 1835. Unuamomente la inĝenieroj estis britaj kaj la laboristoj ĉefe irlandanoj dungitaj en Novjorko kaj ankaŭ anoj de la Kanaria insularo. La kuba registaro malfidis pri la lokaj laboristoj. La tasko estis peza kaj plena je problemoj. La laboristoj malsaniĝis, marĉejoj en la regiono kaŭzis grandajn problemojn en la metado de la reloj. Krome oni altigis la prezon de la fera mineralo dum tiuj jaroj. Male, la mallonga distanco inter Kubo kaj Usono faciligis la alvenon de pliaj laboristoj kaj ankaŭ de novaj usonaj inĝenieroj, kiuj adoptis malsimilajn teknikajn solvojn al tiuj proponitaj de la britaj fakuloj. Kelkaj monatoj antaŭ la inaŭguro de la linio vagonaroj venis el Usono, anstataŭ el Britio, kiel unuamomente oni decidis.



Vagonaro konstruita en Usono kiu trairis Kubon en la jaro 1838

Okaze de la nomo-taga festo de la hispana reĝino Elizabeto la 2-a de la jaro 1837, tio estas la 19-a de novembro, oni inaŭguris la unuan linion inter La Havano kaj Bejucal, kiu poste plidaŭriĝis ĝis Güines. Dum tiuj unuaj jaroj lokomotivo trenis 7 vagonojn kun vojaĝantoj laŭ tri kategorioj: en la unua la vagonoj el luksa mahagona lignaĵo, havis fenestrojn kiuj povis esti malfermitaj se necese; la plafono el ledo, teniloj el bronzo kaj sid-lokoj kun komfortaj kusenoj. Male, ĉe la tria klaso, homoj vojaĝis sur pin-arbaj sid-lokoj. Vagonaroj transportantaj varojn havis 30 vagonojn kaj okaze de ĉiu vojaĝo estis eble transporte eĉ 75 tunojn. La unua trajno eliris je la 8-a matene kaj ĝi revenis je la 5-a vespere. La distanco inter unu kaj alia loko estis 44 kilometroj kaj ĉiutage, averaĝe, 70 homoj vojaĝis inter ambaŭ urboj.

La konstruo de tiu unua hispana kaj kuba fervojo estis granda sukceso. Dum la unua jaro oni raportis mon-profiton je 307.000 pesoj, pli ol duono estis rezulto de la transporto de vojaĝantoj, la cetera parto de varoj. La ĉefa varo estis la sukero, tamen oni transportis ankaŭ kafon, rumon, tabakon, porkojn, bananojn kaj maizon.

Baldaŭ oni raportis pri la unua akcidento. Dum la mateno de la 15-a de januaro 1838, la lokomotivo hupis laŭte kaj tio provokis stampedon de bovoj kiuj ĝis tiam trankvile ripozis apud la reloj. Unu el tiu bovoj koliziis kontraŭ la lokomotivo kiu tuj elreliĝis. Feliĉe neniu homo restis vundita.

HISPANA AMIKARO DE FERVOJISTOJ ESPERANTISTAJ



José María Rodríguez

LA 6-A ESPERANTO-STAĜO EN METABIEF



La aranĝo okazis de la 23-a ĝis la 29-a de aŭgusto 2020 en montareca pejzaĝo de ĵurasia regiono en la vilaĝo Metabief proksime de la svisa landlimo. La aranĝon organizas la klubo de "Esperanto *Chalonnais*" sub la gvidado de Anne-Marie Ferrrier jam la sesan fojon. Tiu ĉi jaro estos memorata kiel la jaro de tutmonda pandemio Kovim-19 (kronviroza malsano 2019).

Ni loĝis en montara junulara gastejo *Les Sapins de l'Amitié* (La abioj de Amikeco), kiun prizorgas la asocio

Claj (*Clubs de loisirs et d'action de la jeunesse*). La direktoro Djemel Zeffane afable bonvenigis nin kaj donis informojn pri la domo kaj pri la striktaj kondiĉoj pro la Kronviruso. Ni devis uzi maskojn, krom dum la manĝado kaj dum la instruado. Ekster la domo estis laŭvola uzado de ili.

La unua vespero komenciĝis per la bonveniga aperitivo kaj poste sekvis prezentado de la ĉeestantoj. La aranĝon partoprenis dudek tri geesperantistoj el Francio kaj unu el Svislando. La programo konsistis el matenaj kaj antaŭvesperaj E-kursoj, posttagmezaj ekskursoj al diversaj lokoj kaj la vesperoj estis dediĉitaj al prelegoj aŭ ludoj. Per diversaj ekskursoj la partoprenantoj povis malkovri interesan regionon, promeni en la ĉirkaŭaĵo, bicikli al diversaj partoj en tiu angulo situata proksime al Svislando. Agrablaj por rigardi estis matenaj sunleviĝoj, vesperaj sunsubiroj kaj unufoje eĉ ĉielarko beligis la horizonton.

Plej fluajn parolantojn Renée Triolle instigis al legado de diversaj tekstoj kaj sekvis diskutado. Ni pritraktis diversajn temojn: pri rubaĵoj, kafo, topinamburo, pandemio, atomcentraloj, sekreta vivo de lavmaŝinoj, Marjorie Boulton, judoj kaj holokaŭsto, indiĝenaj lingvoj en Sudameriko, mikrokreditoj, ktp. Ne mankis iom da gramatika ekzercado. Luc Allemand kaj Jacqueline Poux gvidis kurson por progresantoj. Libroservo proponis E-librojn. Andreo Grossmann prezentis kajerojn de TAKE pri konstruado.

Post la bona kaj abunda tagmanĝo ni povis elekti diversajn ekskursojn. Interesa estis vizito de la mezepoka kastelo Fort de Joux transformita al fortikaĵo. Ĝi havas la plej profundan puton (120 metrojn) en Eŭropo. Ne de Orbe el la lago de Joux. En Svislando ni vizitis ankaŭ la muzeon Baud de mekanikaj muzikiloj. Kelkaj el ili estas veraj unikaĵoj. malpli interesa estis vizito al grotoj de *Vallorbe*, situataj en Svislando. La kavernoj estiĝis pro la subtera elfluo.



Alia interesa vizito gvidis nin al la fromaĝejo Marcel Petite. Fort Saint Antoine estas malnova militfortikaĵo transformita al kelo por maturigado de la fromaĝo Comté. Ĝi estas unu el la plej ŝatataj fromaĝoj. Impresis altaj stokoj da plurkilogramaj fromaĝ-diskoj. Feliĉe la laboro estas aŭtomatizata.

En la "Domo de la rezervejo" sur areo je 500 m² estas instalitaj interagaj ekspozicioj dediĉitaj al faŭno kaj flaŭro de la ĵurasa montaro. En proksimeco oni povas

promeni ĉe la lagoj de Remoray kaj de Saint-Point, kiuj estas bone rimarkeblaj el belvidejo en alteco je 940 metroj. Kelkaj el ni biciklis al pli foraj lokoj. En Metabief ni vizitis fromaĝejon de Mont d'Or, kie oni povas aĉeti diversajn fromaĝojn kaj aliajn regionajn produktaĵojn.

Ĝaude ni havis la plezuron akcepti viziton de Mireille Grosjean kun amikino ŝia. Mirejo regalis nin per ĉokoladaj bombonoj "Merci". Venis ankaŭ du instruistoj: Emmanuel Desbrières kaj Alexandre André. Ili instruas en francaj lernejoj kaj rakontis al ni pri siaj spertoj pri enkonduko de Esperanto, pri interŝanĝoj kun aliaj lernejoj kaj pri vojaĝo kun lernantoj al Slovenio.



Vespere Renée Triolle prelegis pri la interesa vivo de Victor Lebrun, kiu estis franca esperantisto kaj iama sekretario de Leo Tolstoj. Alia ŝia prelego temis pri famaj virinoj en Esperantujo. Luc Allemand rakontis

kaj per bildoj ilustris sian vojaĝon per biciklo ĉirkaŭ la Nigra maro. Alian interesan (kvarmonatan) vojaĝadon per ĉevalo prezentis Nathalie Rigaut. Ni ankaŭ ĝuis ludadon de liro fare de Luc Allemand.



Post longa tempo sen fizikaj Erenkontiĝoj ni povis ĝui agrablan semajnon en bona familia etoso.

Liba Gabalda

